# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**
PLENUMITA 12/12/2019 Kvarcentkvindeksesa eldono (unua eldono 20/09/2011)




## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

## Entute 784,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo




Nun studas **290,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **268,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **226,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*



## Gramatika serio "La Verbo en P.A.G.". N.ro.98




En Esperanto la afero pri la Objektoj kaj la Adjektoj estas simpla, ĉar ekzistas nur du malsamaj finaĵoj por la trideko da latinaj. Do kial dividi ilin en tridek? Estas senutila.

Krom la Subjekto kaj la Predikato (Verbo), en Esperanto la frazo konsistas el du pliaj partoj, kiuj estas komplementoj al la Predikato: la Objekto, kiu ricevas la akuzativon, kaj la resto de la komplementoj, nome la Adjektoj, kiuj principe estas aŭ Adverbo aŭ Prepozitivo. Neniuj el la Adjektoj estas bezonataj en frazo.

Depende de la speco de verbo, la Objekto (en etnaj lingvoj nomata Rekta Objekto), estas aŭ necesa aŭ ebla aŭ neebla. Oni do havas tri specojn de verboj. Pri ili venontfoje.

*Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Esperantistoj de sud-orienta Kvinslando festos Zamenhofan tagon je dimanĉo la 15a decembro, Ĉu vi?? *Peter Danzer*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*



# F e s t e t o   e n   m i a   ĝ a r d e n o .

## DANKON !

Mi kore dankas al la geesperantistoj kiuj ensendis gratulon pri mia naskiĝtago. Estas bona scii la ekziston de bonaj geamikoj. Kaj mi ĝojas esti vivanta por ne nur la gesamfamilianoj, sed ankaŭ por povi esti utila al Esperanto, en mia specifa maniero de gramatikospecialisto. Des pli ĉar nuntempe ne ekzistas sufiĉe da ili, post la morto de Kalocsay kaj Waringhien kaj multaj aliaj tiaj.

*Marcel.*

## INVITO .

Kiel ofte menciita, la esperantistaro ankoraŭ uzadas ses gramatikajn erarojn, tri gravajn kaj tri negravajn. Korekti ilin estas mia kaj nia tasko, malfacilega ĉar homoj timas ŝanĝi siajn kutimojn. Mi kaj aliaj do montras kaj montradas tiujn erarojn. Ion alian ni ne povas fari, speciale ĉar la Akademio de Esperanto nuntempe ne estas sufiĉe klera por ekzameni la gramatikon. Parto de la problemo estas, ke la eŭropaj lingvistoj havas kelkajn erarajn konceptojn pri siaj lingvoj, kaj tio pligrandigas la problemon por la Esperantistoj.

La ses ankoraŭaj eraroj en la uzado de la Esperantistoj estas la sekvantaj:

**La tri negravaj**: 1e. La vorto “kialo”;
2e. La kategorio de la Predikativoj.
3e. La multsignifeco de la prepozicio “de”.

**Kaj la tri gravaj:** 4e. La Participoj.
5e. La Verba Pasiva Voĉo.
6e. La Geografiaj Nomoj.

Antaŭ pluraj monatoj mi invitis Esperantistojn serĉi kaj diskuti unu aŭ pli de la ses problemoj, publike, por trovi eventualajn erarojn en miaj asertoj pri la eraroj kaj eventuale trovi ĉu la nuna uzado estas gramatike ĝusta. Ĝis nun ni tial kaj tiel ekzamenis du el la ses temoj, nome la vorton “kialo” kaj la Kategorio de la Predikativo. Nun ke tiu ekzamenado estas finita, mi invitas Martin (P.) kaj Donald (R.), kaj ĉiujn, ekzameni miajn klarigojn pri la malĝusta uzado de la participoj en Esperanto, cetere pro kelkaj miskomprenoj de la eŭroplingvaj participoj kaj tempoj. Mi do en kelkaj vortoj mencias miajn klarigojn pri la eŭropaj miskomprenoj pri siaj participoj kaj pri la Esperantistaj malĝustaj uzoj en sia lingvo (Esperanto).

Kontraŭe al la Esperantaj, la eŭropaj participoj estas verboj kiam ili kombiniĝas kun aliaj verboj, tie nomataj helpverboj. Sed krom la t.n. Prezenca Participo, la eŭropaj lingvoj havas du pliajn participojn, la Perfekta Participo Pasinttempa, ĝenerale uzata kun la helpverbo “havi”, kaj la Pasiva Participo Sentempa, ĝenerale uzata kun la helpverbo “esti” en la franca kaj la angla lingvoj. La du lastaj participoj havas la saman formon, sed ili estas malsamaj Participoj ĉar ili havas du malsamajn signifojn kaj funkciojn. La franca, la itala, kaj la ĝermanaj lingvoj havas do tri Participojn, pro la tri malsamaj funkcioj. Por la eŭropanoj ne gravas, ĉu ili scias ke ili havas tri participojn, ĉar kun aŭ sen scii ili tamen uzas la formojn

ĝuste. Sed la afero malsamas por la Esperantistoj, ĉar se ili ne scias ke ekzistas tri Participoj, unu prezenca, la dua Pasinteca, kaj la tria nur Pasiva, ili pensas, malĝuste, ke iliaj Pasivaj Participoj devas havi krome la pasintan verbindikilon. Ekz. ĉe la angla Pasiva Participo en "*The letter will be received at 4 o'clock*", la participo "*received*" estas sole Pasiva, ne Pasinta, sed la Esperantistoj ne scias tion kaj uzas la Pasintan sufikson en *"La letero estos ricevita*", malĝuste. Kaj ili faras similajn erarojn en aliaj kazoj.

Mi do invitas komentojn aŭ kritikojn pri tiu vidpunkto. Antaŭan dankon!

*Marcel Leereveld.*

**AL VERA .**

Jes, en la eŭropaj lingvoj kaj en Esperanto oni fariĝas sepdekkvinjaraĝa nur post onia sepdekkvina vivjaro, do je la komenco de cia dekkvina vivjaro ci fariĝis sepdekkvarjaraĝa. Ĉar tuj post cia naskiĝo kaj dum cia unua vivjaro ci estis nuljara. *Marcel*.

**ALDONO PRI LA KORELATIVOJ .**

La k-korelativoj, kiuj esence estas Demando-Korelativoj, uzatas ankaŭ kiel Subjunkcioj. Laŭ la funkcio, tiuj Subjunkcioj dividiĝas en du specojn, la Rilatajn Subjunkciojn, kaj la Demandajn Subjunkciojn.

La Rilataj Subjunkcioj ripetas, do rilatas al, la antecedenton en la ĉefpropozicio, kiel en "Mi vizitis LA URBETON, EN KIU (aŭ KIE) mi naskiĝis." kaj "Kiun urbeton ci vizitis?" Mi vizitis TIUN, KIU suferis pro tertremo"; aŭ "Mi manĝis TIOM (aŭ SAME MULTE, aŭ SAMAN KVANTON), KIOM mi manĝis hieraŭ". La Rilata Subjunkcio havas la saman Singularon aŭ Pluralon kiel la Antecedento, sed ne necese la saman Nominativon aŭ Akuzativon. Ĉiu el la naŭ k-korelativoj povas uzati kiel Rilata Subjunkcio. Jen ekzemploj:

Mi ne ŝatas TIOJN, KIOJN ci menciis. Mi preferas TIAJN ROZOJN, KIAJ kreskas en ŝia ĝardeno. Oni ŝtelis TIES BICIKLON, KIES PATRO ĵus mortis. Ŝi loĝas EN LA URBO, KIE ŝi naskiĝis. Mi ne scias LA MOTIVON, KIAL li foriris. Li laboras SAME TIEL, KIEL laboris lia patro. Mi memoras LA OKAZON, KIAM li havis akcidenton.

En ĉiuj tiuj kazoj la Rilata Subjunkcio ripetas la antecedenton, kiu lasta devas esti la bazo de pluformado: do "Mi ne memoras la motivon, kial li eksiĝis" = "la motivon, kial" = "tial, kial" = "la tialon de lia eksiĝo".

Ĉe la Demanda Subjunkcio ĝi aludas al la tuta Ĉefpropozicio, kvazaŭ temas pri kaŝita demando: "NENIU EL NI PLU SCIAS , EN KIU TAGO ( KIAM) ni renkontis ŝin dum la kongeso = "En kiu tago ni renkontis ŝin ?" La funkcio de la subjunkcio ĉi tie estas kaŝita demando "En kiu tago ?". Do "Kiam?". Do "Ni demandas nin, kial li foriris" = "kial li foriris?" = "la kialo" = la demando. Ĉe la Demanda Subjunkcio la verbo en la ĉeffrazo estas speco de demando aŭ informiĝo, kaj sekve la suborda frazo estas speco de demando: "Ni forgesis, kiu gajnis" = Ni volas scii, ni demandas, kiu gajnis, "Kiu gajnis?".

*Marcel Leereveld.*

**ALDONETO PRI LA KORELATIVOJ .**

La korelativo "kiel", kiu normale indikas demandon pri la maniero, estas krome uzata en la signifo de "en la funkcio de" aŭ simple "esti", kiel en:
Ni elektis lin KIEL prezidanton aŭ EN LA FUNKCION DE prezidanto aŭ ESTI prezidanto.".

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Same kiel en "Mi (estante prezidanto) elektis lin KIEL prezidanto, aŭ ESTANTE prezidanto, aŭ EN MIA FUNKCIO DE prezidanto. En ĉi tiaj kazoj la origine demanda adverbo estas nek adverbo nek demanda, sed la gramatiklibroj ne klasifikas ĝin kiel kategorian. Eble nomi ĝin Konjunkcio estas la plej konsilinda. Notu la malsamajn kazojn: "Mi akceptis lin kiel mastro (= kiel lia mastro) (= mi estas la mastro) kaj "Mi akceptis lin kiel mastron (= kiel mian mastron = li estas la mastro).

*Marcel Leereveld.*

**AL ERHARD .**

Ankoraŭ nun ni perdas amaton aŭ amatinon per la morto, kiel Heroa kaj Leandro. Espereble ci povos trovi pliajn tiajn kazojn en la greka antikvo, kaj rakonti ilin al ni. Mi mem ankaŭ perdis amatinon, kaj ŝi min, sed ŝi mortis kaj ne mi. *Marcel Leereveld.*

**AL DET KONING .**

Antaŭ naŭdek jaroj mi uzis en Nederlando ne la vorton "plesant", sed la vorton "plezierig". Mi sciemas, kiun vorton oni uzas nun por "plezura". Kvankam mi naskiĝis en Amsterdamo, miaj gepatroj donis al mi francan nomon, pro ilia amo ante operojn. Kaj unu el miaj nepinoj donis al unu el siaj filoj la nomon "Marcello", ankaŭ pro amo ante operojn.

Sed en la antikva Nederlando de 1917 neniu havis la nomon "Marcel", kaj la urbestraro de Amsterdamo rifuzis tiun nomon. Miaj gepatroj devis transloĝiĝi al malgranda artista vilaĝo (Blaricum) por sukcesi. *Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



## La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm.
Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
La 7a de Decembro estis la unua sabato. Venis al nia amikema kunveno.
Roger, Michael, John kaj Ian.





*Roger S*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## *La Esperanto-Federacio de Viktorio*

*invitas vin al sia "Zamenhofa Festo"*

*7.00 ptm, Sabaton la 14an de Decembro 2019*

*ĉe la "Melbourne Unitarian Peace Memorial Church"*

*110 Grey Street, East Melbourne.*

*Ĝuu vesperon da muziko, kantoj, paroladoj, kaj aliaj distraĵoj*

*Bonvolu alporti pladon*

*Ni esperas ke vi celebros kun ni.*

Heather Heldzingen

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Faktoj por Vegetaranoj kaj Ĝardenistoj





Oni eltrovis ke plantoj de tomato kaj tabako kaj iuj kaktoj sonas, je frekvencoj kiujn homoj ne povas aŭdi, kiam ili suferas por manko de akvo aŭ dehakado de sia tigo. *Roger Springer*



# Kiu ŝatus korespondi kun kuba esperantisto?

Mia nomo estas Luis Rafael, mi lernas Esperanton kaj mi volas havi korespondadon kun vi.

> Mi estas kubano kaj mi estas 43 jaraĝa, mi estas komencanto.

> Se vi ne interesiĝas pri korespondado kun mi, bonvolu doni al aliaj mian retadreson.

> (luisrafael.berrios@nauta.cu)

# Alvoko al pliaj kontribuoj !

## Alvoko al donacoj kaj subtenoj por dormĉambro por handikapulo 2020



En la staĝo Aŭtune 2019, ĉiuj ĉambroj de la kastelo kaj de la kromdomoj estis okupitaj, de entute 71 ĉeestantoj el 6 landoj… Kaj baldaŭ, unu plia ĉambro estos alirebla, eĉ alirebla per rulseĝo konforme al la nunaj leĝoj.

Danke al la donacoj de societanoj kaj al la senpaga laboro de sindonemaj volontuloj, progresas la konstrulaboroj. Post la necesejo en la verando alirebla per rulseĝo, René Jelenc kaj pluraj kunlaborantoj pretigas la plian ĉambron laŭ la samaj normoj. Sed ne ĉio estas farebla de volontuloj : la tegmenton de la dekstra kromdomo profesiuloj entute renovigis antaŭ kelkaj



monatoj, ili renovigos tiun de la maldekstra kromdomo principe venontjare, ankaŭ akceptiĝis propono dreni la malantaŭan muron de la koncerna konstruaĵo, kaj pliaj projektoj atendas, kiel konekti niajn tubarojn al la urba kloako, plibonigi la enirvojon al la kastelo, krei du pliajn

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

ĉambrojn alireblajn per rulseĝo kaj iam renovigi la tutan tegmenton de la kastelo mem.

Vi povas kontribui al tiuj ĉi plibonigoj, ĉu proponante helpi en la laborado de la volontuloj, ĉu per mondonaco al la Kulturdomo, ĉu fariĝante societano de la Kulturdomo kaj aĉetante societajn partojn A kaj B. Per 16-€ pago, vi fariĝos dumviva societano de la Kulturdomo. Sed tiu ĉi societa parto A ne estis aktualigita depost la kreado de la Societo, en 1951, ĉar la franca leĝo malebligas tian aktualigon. Do ni kreis kromajn societajn partojn B, po 200 €, kaj ĉiu societano rajtas aĉeti ĝis 50 societajn partojn B. Tiuj ĉi ne donas plian voĉdonrajton, sed la sumon oni povas rehavi kaj ĉiujare ĝi provizas etan interezon.

Se vi estas preta helpi nin ĉu per donaco, ĉu per aĉeto de societaj partoj A kaj/aŭ B, ĉu per partopreno en la konstrulaboroj, bonvolu turni vin al Bert Schumann aŭ René Jelenc. Multan antaŭdankon pro via kontribuo !

## Heredaĵo de Margaret Chaldecott




Margaret Chaldecott forpasis la 25-an de marto, 2019. Ŝi estis dum longa tempo membro de la Sidneja Esperanto-Societo kaj, ekde 1964 Margaret estis diverstempe sekretario, prezidanto kaj kasisto de la Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrio (kaj la redaktisto de la novaĵletero "Telopeo") kaj estrarano de la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Ŝi estis delegito de UEA dum multaj jaroj.

Margaret testamentis proksimume 1/5-an de siaj valoraĵoj kaj siajn Esperanto-Librojn al la Federacio. Ni jam ricevis $ 324,000 kaj ricevos proksimume $ 60,000 je posta dato post la vendo de domarero.

EFNSK planas organizi diskuton pri kiel ni povus uzi la monon el la heredaĵo de Margaret Chaldecott. Viaj ideoj kaj sugestoj helpos nin fari ĵustan decidon.

**Ĉerpaĵo el T11-12-2019 Telopeo** *Roger Springer*

TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo



Telopeo ekzistas ĉar Margaret daŭrigis ĝin dum multaj jaroj, trovante enhavaĵon, tajpis, enpoŝtigis, kaj prizorgis la bezonitan adresliston de ricevantoj. Margaret estis oficiro en la VAD (Volontula Asista Taĉmento, iu ina parttempa armea grupo.) La parttempa armea sakŝalmistaro muzikis por la VAD, do mi, iel, sakŝalmisto renkontis Margaret antaŭ 57 jaroj.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



Poste mi re-renkontis ŝin en Esperantujo

Margaret estas konscienca, subtena kaj fidema ano de EFNSK. Ŝi estis la sekretario dum jaroj kaj fidinde ĉeestis por malfermi Esperanto-Domon je ĉiu Merkredo

Se estis bezonata, ŝi ofte ĉeestis ED je aliaj tagoj de la semajno.

Ŝi prizorgis la gastĉambron, ofte bonvenigis la gastojn, prizorgis la korespondadon, la bibliotekojn, la librojn kaj la bezonitan mastrumadon, ktp. je ED.

Margaret tajpis la provizoran 32 paĝan 'Key' libreton en komputilon.




Margaret estis fonto de la historio de EFNSK kaj Esperanto-Domo.



Nur kiam korpe ŝi ne plu povis veni al ED, ŝi retiriĝis de Esperanto-Domo.

**La Federacio dankegas ŝin pro ŝia granda laboro. 2016**

**Ĉerpaĵo el Aŭstraliaj Esperantistoj 420** Roger Springer

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Saluton el Kimrio!



Mi tre ŝatas ricevi la novaĵojn de Aŭstralio kaj precipe ĝuas legi ke Marcel daŭre vivas kaj aktivas. Bonvolu pasi miajn datrevenajn gratulojn al li.

Ŝajnas ke esti esperantisto povas plilongigi la vivon, ĉar lastatempe mi aŭdis pri 106-jaraĝa esperantisto kiu loĝas en Eŭskio - Eduardo Larrouy - https://eo.wikipedia.org/wiki/Eduardo_Larrouy

Tre amike, *Deborah McCarney*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



**3ZZZ** ... Aŭskultante la elsendon de la 9a de decembro vi ekscios pri AMO seminario kaj tiel preparos vin por la proponoj de Stefan MacGill kadre de la kongreso okazonta en Aŭckland en januaro 2020. Nepras protekti la naturon , interalie la arbojn . Julius haŭser klarigas kial. Informas la kunvokanto, *Franciska Toubale*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



Malnova problemo en Aŭstralio kreskas pro la ŝanĝo de la monda klimato

*Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***